

Genevo 20.6.64



ESPERANTO - GRUPO
LA STELO

CASE 10 RIVE GENÈVE

Monata informilo de la
Geneva Esp.-grupo
"LA STELO"
jaro 1-a n-ro 1



brasilfolio

Pro trimonata ferio (1.7.64 - 30.9.64) en College Moderne, niaj kunvenoj okazos ek-de la 3-a de julio, ĉiuvendrede en la restoracio "Sans Alcool" en place Montbrillant je la 20.15 h en la 1-a etaĝo.

24.7. diapozitiv-projekciado pri niaj pasintaj aranĝoj.

VIZITO AL CREVIN ARBARO

Ho! Kiom ci estis plaĉa, akceptema, disdonanta freŝan aeron kaj senbrua sen aŭtomobiloj, ho! Salevo ĉiam ŝatata de la ĝenevanoj.

La 13-an de junio en Rondeau de Carouge sub peza suna varmeo, la stela karavaneto ekpaŝis al la celo. Tiel kruda estis laceco kaj soifo ke, pro tiuj tre kompreneblaj bezonoj, ni konsentas halti sur teraso de 1^a Auberge de la Maison Grise (ĉarma nomo), je la fino de Troinex. Sed, ĉar ne estas dece havi soifon antaŭ ĉiu trinkejo, ni senhalte preterpasas la Ferme de 1^a Hôpital tra ĉarma vojeto ombrumata per arboj. Sed tiu-ĉi vojeto laciganta devigis ripozon ĉe paca kapeleto. Tuj amiko Fantin, per plumo fotis ĝin. Reirante ni trairas la kvietan Crevin. Sekvante la konsilon de junuloj, ni laŭiras orverdajn tritikojn kaj haŭtas, hezitemaj, ĉe arbaro apud plugita kampo. Dolĉa vento rekompencas nin de la sunaj momentoj kuraĝe toleritaj. Laŭ la informoj de nia stafeto Fantin, ni ekscias ke, por iri al Lassalle-Monumento, ni devos agi preskaŭ kiel Robinson Crusoe en la virga arbaro. Tia situacio "tre drama" ne formetis nian ĝojan kvieton. Niaj s-inoj, ĉiam patrinemaj, eltiras infajn sekretojn el plenplenaj sakoĵ. Oni manĝas, trinkas kaj kantas, s-ano Jakob estas ĉe buŝorgeno (harmoniko). La momento estas tiel plaĉa ke, s-ino Masè kredas flugi en paradizo ĉirkaŭita de ĉarmaj geaĝeloj. Sed la horo devigas nin foriri. Ni trovas vojeton, kies fino estas tre kruta, transiras grandan landliman straton malpezaj kiel papilioj, vidante eĉ ne unu doganistan nazon.

Afereto, kiu emociĝos s-ron Bischoff: katido sekvas amikon Jakob. Li karesas kaj parolas al la besto. Ŝajnas ke, ĝi ne komprenas Esp.-n, ĝi ne estas verda kato. Vere estas ankoraŭ multe da laboro!

Bedaŭrinde la bonaĵoj ĉiam finiĝas kaj ĉiam tro rapide. Post la 21-a horo, ni reestas en la urbo kaj dispartigas, ĉiu irante al la direkto de sia lito. Ne preterlasu la okazon ĉeesti la estontajn promenadojn!

Arva SABLERO
E. CURTIS

EL NIA LETERKESTO

poŝtkartojn de: Esperanto-societo Zürich, s-ro Debernardi el Lyono, s-ro Curtenaz el Aix-les-Bains. Leteron de la Unuiĝintaj Nacioj ehtenantan cirkuleron fare de germana esperantisto, en kiu pluraj proponoj rilatantaj la disvastigon de Esp. en ĉiu kampo estis prezentitaj. UNO mem afable petas nin pritrakti la diversajn proponaĵojn kaj respondi al la sendinto.

++++++

London la 15-an de junio finiĝis Esp.-kurso en la popola universitato. La kurso komenciĝis kun 10 gelernantoj, el kiuj du ne daŭrigis la lernadon, du novaj enskribiĝis post la unuaj lecionoj. Al la novbakitaj esperantistoj: gratulojn kaj bonan daŭrigon en la funda konado de la lingvo. Ili estos bonvenaj en nia grupo, de kiu ili "rajtas" membriĝi.

++++++

DORMATAKO EN LA LERNEJO

En unu el niaj lecionoj de Esp. en la popola universitato, okazis komplikaĵo; nia bela kunlernantino f-ino Attilia cedis al dormdeziro, kaj, kiam estis ŝia vico legi, ŝi ne povis trovi la ĝustan punkton en la teksto. Kompreneble, ŝi ne sekvis nian legadon, ĉar ŝi preferis esti en la brakoj de Morfeo. Cetere, la unua printempa varmece influis ankaŭ "Masetulinon" f-inon Clara, kies okuloj aspektis pomkernoj.

Strange! Al miaj svisaj kunlernantoj neniam io simila okazas! K.F.

Esperantista eksterlanda gaste donacis al nia grupo 10 frankojn. La kasistino bone fartas, ŝi rezistis al tiu emociiga ago. Vi, do, povas sentime imiti la donacinton.

++++++

Kiel pasiva membrino de nia societo aliĝis ĉi-monate s-ino Marcelle Isler el Svislando. Ŝi estas kore bonvena.

+ + + + +

Desegnaĵoj de Klono Fantin



Ĉu la fiŝo estas dika?

Ha! Tie! Jes...estas via patrine, kiu falis en la akvon!

+++

EN SKOTLANDO

En montrofenestro pri funebraj aferoj: "Nekredeble!! De la tero ĝis la ĉielo por dek sterlingoj nur!!!"

+++

ONI SERĈAS LABORON (esperante ne trovi ĝin)

Dekdujara ĉambropentrismo serĉas laborlokon. Skribu al: s-ro Mario Pino 12, rue Gilbert Meyrin, Genevo.

+++

ONI SERĈAS LOĜEJON

Junulo dudektrijara serĉas duĉambran hejmon por si kaj sia deksesjara fratino, en saĝa familio. Skribu al s-ro Klono Fantin Ch. 12, Genevo.

+++

ONI SERĈAS HOMOJN

El la Esp.-kurso malaperis sinjoro Itxso Xavier, el la kunveneĵo s-ino Odette Fregonara. Kiu havas sciigojn pri ili bonvolu skribi al: Esperanto-grupo "La Stelo" case 10 Rive Genevo.

Genexbo 30.7.64

Monata informilo de
Geneva Esp.-grupo
"LA STELO"
jaro 1-a n-ro 2



ESPERANTO - GRUPO
LA STELO
CASE 10 RIVE GENÈVE

brasikfolio

Niaj kunvenoj okazas ĉiuvendrede en la restoracio "Sans Alcool"
en place Montbrillant je la horo 20.15 en la 1-a etaĝo

8.8.64

Sabaton la 8-an de aŭgusto promenado al Loey - Vernier
Rendevuo: je la horo 14.30 en Pont de St. Georges, piede de
Bois de la Bâtie. De tie, ni marŝos laŭ la rava vojeto apud
la rivero Rhône ĝis Loey, kie ni piknikos. Reveno per la aŭto-
buso de Vernier.

28.8.64

Lumbildprezentado pri feriovojaĝo de Genevo al Rjeka, fare de
s-ro Hans Altherr. (Ĉeesto al jugoslava nacia Esp.-kongreso)

11.⁹8.64

Vizitos nian klubon japana samideanino, s-ino Yukiko Isobe

+++++

Kiel aktiva membro de "LA STELO" aliĝis en julio s-ro
Pino Mario el Italujo. Li estas kore bonvena en nia rondo

++

+++

En la pasinta monato la ĝeneva radio invitis s-ron Jakob
pareli, en la kadro de la internaciaj organizaĵoj, pri la
fondiĝo de UEA. Nia pioniro ne nur elokventis pri la naskiĝo
de UEA kaj ĝiaj fondintoj, sed li prezentis Esperanton ĝene-
rale. La radiodissendo daŭris 20 minutojn

+++

Artikolojn, sugestojn, rimarkojn, kritikojn, poeziaĵojn,
humoraĵojn sendu ! "Brasikfolio" ĉien publikigos

A NOS MEMBRES SYMPATHISANTS

Aux vérités dont on a fait père La Palice, on peut ajouter celle-ci: les membres actifs et les membres sympathisants constituent deux catégories différentes. Ce qui est évident! Il est nécessaire d'ajouter que la seconde aide grandement la première et que l'on peut avoir (et le démontrer utilement), de la sympathie (même beaucoup) pour l'idéal esperantiste, sans utiliser - pour des raisons très diverses - l'Esperanto. Nous estimons donc nécessaire de nous adresser en français à cette catégorie de nos samideanoj, qui nous accordent, par leurs cotisations, ce fameux "nerf de la guerre" sans lequel aucune œuvre humaine utile n'est viable.

La présente petite feuille, dont le nom "BRASIKPOLIO" veut dire: feuille de choux, démontre bien que sa seule prétention est d'être un lien utile entre les membres "toutes catégories" de notre petit groupement genevois. Ainsi l'a voulu sa créatrice, (censuré). Cette humble feuille vient de commencer sa vie. Le présent numéro est le deuxième. Nous espérons que vous l'accueillerez avec intérêt. Et nous osons croire que vous consentirez à nous aider dans la recherche de membres nouveaux. Ce recrutement est très important car il est prouvé depuis fort longtemps que c'est seulement par la puissance du nombre de ses adhérents qu'un mouvement pacifique tel que le notre peut affirmer la nécessité de son existence.

Emile Curtenaz

EL NIA LETERKESTO:

poŝtkartojn de: s-ro Eskil el
Danlando, s-ro Curtenaz el Re-
vens (Vaud), ges-roj Piron el
Primošteno kune kun aliaj ŝe-
estantoj de la adria esperant-
tista kampadejo, s-ino Masè
el pluraj urboj surstrate de
Genevo al Trieste, s-ro
Altherr el Rjeka okaze de la
jugoslavia Esp.-kongreso, la
poŝtmarko surhavas esperantan
stampon, s-ro Vatrè alportis
salutojn de la partoprenintoj
al kunveno: Svisaj Esp.-Edu-
kistoj, modele organizita de
s-roj Gacond kaj Frézard en
bela jurasa regiono

POR PLI SATI GRAMATIKON

FARU LINGVAN GIMNASTIKON !

La amo kaj la emo tre fratinas :
En amo, nia ĉefa vivkondiĉo,
Kun ges amo nur ni disciplinas !
Sen amo "amo" estas- ne feliĉo !
Ĉu iu iun ani ja inklinas,
Decidas ŝia emo per dediĉo.
La ulo elas, se ne ŝia alo
Lin volas ilo por ŝielkialo !

-HHZ-

++++

Estas saĝe havi ŝiam en la poŝto, aŭ mansake Esp.-propagandilon, por
doni al geamikoj, kiam subite prezentiĝas la okazo: la ŝi kune aldo-
nita bone taŭgas por tiu celo. Pliajn samajn, aŭ alispecajn vi povas
havigi al vi dum niaj kunvenoj

Genevo 30.8.64

Monata informilo de
la ĝeneva Esp.-grupo
"LA STELO"
jaro 1-a n-ro 3

★
ESPERANTO - GRUPO
LA STELO
CASE 10 RIVE GENÈVE

Texte français
sur 3-eme page

brasikfolio

Niaj kunvenoj okazas ĉiuvendrede en la restoracio "Sans Alcool"
en place Montbrillant n-ro 17, je la horo 20.15, unua etaĝo

- 11.9. Ne en oktobro, kiel anoncitis en Brasikfolio n-ro 2, sed vendrede
la 11an de septembro vizitos nin s-ino Jukiko Isobe el Japanujo,
kiu faros lumbildprelegon pri sia lando kaj ties kutimoj
- 18.9. Georges Agricola : Memoraroj de esperantista veterano
- 25.9. S-ro Claud Piron prelegos pri Primoŝten la famkonata esperantista
kampadejo
- 26.9. Ekskurso al Vesenaz. F-ino Schaffert afable nin invitas al sia
domo en la kamparo. Forveturo el Rive per la buso n-ro 9, je la
horo 14.05 (ne maltrafu ĝin !) Se la vetero malbelos, la aranĝo
prokrastiĝos al la posta tago, dimanĉon la 27-an de septembro

++++

Vi povas ricevi senpage pliajn ekzemplerojn de Brasikfolio. Ni
sendos ilin laŭ via mendo

++++

Deziras korespondi kun svisa sam-anino : s-ino Maria Haagr
Gyöngyösi utca 47 fsz Budapest XII Hungarujo

++++

El nia leterkasto : gefratoj Attilia kaj Pino Caron sendis poŝt-
karton el Bessano del Grappa kaj f-ino Mouron el Istanbul.
El Vevey s-ro Maillard salutas nin

++++

Ni petas ĉiujn membrojn varbi por la Esp.-kurso, kiu okazos en
la venonta aŭtuno

Lama balado

se timo vin izolas
vendrede de l'kermeso,
se hejme vi parolas
neniam sen permeso,
tuj artu per artiko
aŭ penu per peniko,
kaj sendu per ekspreso...
La spacon ni prodigos
je via intereso :
ni ĉion publikigos !

Se vi recepton volas
por fumi sen eksceso,
aŭ gaje protokolas
la klaĉojn de l'kongreso,
nun indu per indiko
kaj trafu per trafiko,
eĉ se al amkonfeso
la nokto vin instigos,
ni ĵuras je Ramseso,
ni ĉion publikigos !

Se via dorso molas
pro bat' aŭ pro kareso,
se via cerbo bolas
ĉar hejtas ĝin absceso,
se vin virino ravas,
se vi kolikon havas,
tuj skribu pri l'impreso...
Se la leter' navigos
ĝin nia poŝtadrese,
ni ĉion publikigos !

Nenie, krom neceso,
liveron vian digos,
eĉ ne la paperĉeso !
Ni ĉiun publikigos !

Mirliton

postvivantaj esplorantoj daŭrigis kuraĝe al la celo, tra freneze simpatia arba vojeto, admirante la sovaĝaspektan naturon. Indikilo, kiu avertas, ke la vojeto al Loëx estas barita lasas nin indiferentaj kaj ni daŭrigis sekurpaŝe kaj gaje. Fine estis tempo trankviligi nian stomakon per riĉa piknike. Tuj poste aperis problemo, ĉu daŭrigi la ekspedicion aŭ retreti. Nek daŭrigi nek retreti estis la decido, sed supergrimpi la deklivan monton sur kiu mistera konstruaĵo nin altiris. Estiĝas en ni konkerentuziasmo, ni ekskaladis heroe la krutaĵon sur kies supro ni konstatis esti en la urbosatelito de Onex. La "dangera" parto de nia vojaĝo estis for. Ni hejmeniris kontentaj pro la kontakto kun la naturo kaj la samideana harmonio

Antaŭ ne longe fondiĝis en Genevo internacia grupo de homoj interesigantaj pri la poezio de la plej diversaj landoj. Dank'al s-ro Bouvier, s-ano Piron kontaktis tiun grupon kaj prezentis al ĝi prelegeton pri: "Esperanto je la servo de la poezio". La kunveno bone sukcesis kaj en la junia-julia n-ro de la revuo "Poesie Vivante" aperis sub la titolo "Poésie sans frontiere" artikoleto pri la ekzisto de originala Esperanto-poezio kaj esperantaj poemoj kun traduko en la francan lingvon.

"Poesie Vivante" estas aĉetebla ĉe librejo Des Cambes 6, rue du Vieux- Collège, aŭ en librejo Georg 5, Corraterie.

++ ++

Sabata ekskurso (8.8.64) Dekumu partoprenantoj ekiris ĉe la piedo de Bois de la Batie post trikvaronhora malfruo kaŭze de gajulo, kiu taksis al Meyrin. Li emis ŝanĝi siajn mallongajn, sed (laŭ lia opinio tro longaj) pantalonetojn, ĉar li deziris superi ĉiujn en beleco kaj elegantece. Sed, pedikmasakro!! Li reaperis same vestita, tenante en papera saketo sian multvaloran ventro-k.t.p.-kovrilon. Iom pli poste, en kaŝejo, li anstataŭis siajn malbenatajn pantalonetojn per la ĉarmaj helbluaj, kiuj frape kontrastis kun la abundaj, nigraj gambaj haroj. Eksterordinara Mario!!

Post supreniro de Bois de la Batie kaj preterirado de la tombejo St. Georges, ni atakis la descendon al Rhône. Jen, du samideanoj, ne hazardis tiun longan kaj danĝeran entreprenon, nin forlasis kun bondeziro pri sukceso en nia aventuro. La

Retla

Stranga epitafo en Skotlando

Ci-tie dormas de sia lasta dormado sinjoro Y.Z., al kiu la viskio permesis vivi 93 jarojn. Li estis ĉiam tiel ebria, ke la morto timis lin. Tamen iun, tagon kiam li eksterordinare forgesis trinki sian kutiman viskion, la morto kaptis la okazon forpreni lin.

+++++

Vere, diras patro al sia filo, mi neniam pensis, ke viaj studoj kostus tiom multe ! Tamen , patro, diris la filo, por ŝpari monon mi studis tiel malmulte kiel eble !
Trad. Verda Abio

KroKodila Parto



C'est d'une manière paraissant bien étrange que, dans notre précédent numéro, nous avons pris contact avec nos membres sympathisants. En ma qualité de "rédacteur de service", j'ai suivi mon penchant naturel, de déroger un peu

aux règles depuis longtemps établies. J'ai, d'abord, mis ma plume sur la crue réalité, sur cette dure réalité: qu'il est impossible de partir en guerre, même pour une guerre qui ne fera pas de victime - sans être armé.

Alors, maintenant que cette vérité est nettement établie, après que, peut-être, je vous ai étonnés, je vous salue, amis esperantistes et je vous dis MERCI, au nom du Comité de "La Stelo", du noyau des actifs qui l'entoure et l'assiste, ainsi qu'au nom de ceux dont la vie et ses obligations font qu'ils ne peuvent fréquenter plus souvent nos réunions.

Par ma plume nous vous convions à "venir voir comment ça se passe" lors de nos vendredis soirs. Ils ne sont nullement rébarbatifs. Les jeunes, et aussi ceux qui le sont moins, savent les faire plaisants et même joyeux. Si vient nous visiter quelqu'un pour qui l'usage de l'esperanto n'est que peu familier, ou même ne l'est pas du tout, ce visiteur est, aussitôt après les sourires d'accueil, assisté l'un ou plusieurs traducteurs aimables et expérimentés.

Allons! vous en êtes gentiment priés, venez nous voir quelquefois; un jour où vous choisirez l'esperanto au lieu d'une séance de cinéma. Ne craignez pas de venir accompagné de l'ange de votre foyer, avec le grand garçon ou la grande fille: Les blousons noirs ne s'intéressent pas à l'esperanto.

Jusqu'à fin septembre 1964, nos réunions vous attendent, chaque vendredi, de 20 h. 1/4 à 22 h., au "Restaurant sans alcool", place Montbrillant 17, angle rue Fendt, 1er étage.

Acceptez, chers membres sympathisants, notre joyeux AU Revoir!

Emile Curtenaz

Geneve 30.9.64

Monata informilo de
la ĝeneva Esp.-grupo
"LA STELO"
jaro 1-a n-ro 4

★
ESPERANTO - GRUPO
LA STELO
CASE 10 RIVE GENÈVE



Texte français
sur 3-eme page

brasikfolio

A T E N T U ! ek-de la 9-a de oktobro, niaj kunvenoj reokazos en College --
- Moderne, rue d' Italie , je la horo 20.15, 1-a etaĝo ĉambro 21

+++++

9.10 "Memoraĵoj de esperantista veterano", prelego de Georges Agricola

+++++

16.10 ESP.-EKZERKADO PER DIAPOZITIVOJ. Temo: "niaj amikoj, la bestoj". Vi laŭvice estos petataj komenti la bildojn. La ĉeestantaro rajtos fari la plej strangajn demandojn al la ekzamenato

+++++

18.10 TAGO DE LA PACO en la landa ekspozicio en Losan.

La Centra Komitato de Esp.-Edukistaro de Svislando, alvokas ĉiun samidean(in)on partopreni tiun gravan manifestacion franclingvan, por montri per multnombra ĉeesto, ke Esperanto vivas kaj celas al paco inter la popoloj. Ni tiel prezentos la internacian lingvon al tiuj gravaj pripacaj internaciaj organizaĵoj, kiuj nepre bezonas ĝin.

Inter la parolontoj troviĝas tri esperantistoj.

Ni trajnos kolektive kaj, laŭ la nombro, povos ĝui kolektivan enirbileton. Por informoj kaj aliĝoj, skribu al nia poŝta adreso ĝis la 13-a de oktobro.

+++++

23.10 Lumbildpromenado kun f-ino Arlette Mouron, tra Italujo, Jugoslavio, Turkujo kaj Bulgarujo.

+++++

30.10 Studvespero sub la gvidado de s-ino Stakian. En la dua parto: prezentado de lumbildoj pri niaj pasintaj aranĝoj. ++++++

ESPERANTO-KURSO

sub la gvidado de s-ro
Piron, komenciĝos merkredon la 14-an
de okt. en la Popola Universitato en
rue de Saussure 6, je la horo 20.15
Varbu viajn amikojn, ia ajn estu ilia
gepatra lingvo, la kurso estos en Esp.

DEDICO AL NOVA PARO

Isabela, dolĉa edzin'
Vi fariĝis, kaj amas "lin"
Plej fidele. Ĝuu do kune
Longan vivon mielolune !
Amo, kun estimo kaj ĝoj'
Estu l'ornam' de via voĵ'.

Mad Mevo
en la nomo de la Stelanoj

grama tike

utilas ege la verbo
sen ĝi la frazo ne pretus
simile gravas la cerbe
sen ĝi kreteno kompletus

la nom' eĉ propra komunas
pletoras ĉie Johanoj
nur unu sun' al ni sunas
sed ja triopas Gujanoj

la artikolo mallongas
krom se ĝin verkis Lapenna
la komplement' al si spongas
no-finon per suĉo drena

se ĉe l'unua persono
du singularoj enuas
tuj per opona pronomo
pluralon ili kunĝuas

la participojn evitu
en ili kuŝas malbeno
sed vian karan invitu
vendrede al la kunveno

mirliton

++++

Al Isabela

Kiel ĉarma via ĝardeno
Estis en la dolĉa sereno
De tiu sunbrila aŭtun' !
Isabel', ĵusnova edzin'
De Ernest, vi akceptis nin
Kortuŝe ! Sub milda la sun',
Via ride sonis feliĉa ;
La patrin' - je filo pli riĉa -
Kontente rigardis al vi.
Trinkis, manĝis ni, la Stelanoj;
Ludis sur herbej' la infanoj,
Kiel Esperant - famili',
Kaj kiam eksonis momento
De l'forir', en kora kunsento
Restadis ĝis lasta minut'
Kvaro kara, unuanima,
En la saloneto intima,
Guante kantadon kun flut'.

Mad Mevo

verdstelanoj en Vesenaz..... kie f-ino Schafferd, ho! pardonu, nun sinjorino Haldimann akceptis nin en sia kamparana hejmo. La naturo, la feliĉo de la ĵusbakitaj geedzoj, nia lingvo igis nin kontentaj, kaj... kial ne, ankaŭ la belaspekta kaj speciale bongusta piknike kontribuis. +++
Ĉiuj aranĝoj estis belnombre vizititaj.

EN LA PASINTA MONATO vizitis niajn kunvenojn du eksterlandaj gesamideanoj: inĝeniero Savir (Suckever) el Israelio, kune kun siaj edzino kaj filino. Ili estis ĵus revenantaj el la UK kaj portis al ni la plej freŝajn sciigojn pri ĝi. Samideano Savir faris lumbildprelegon pri Malio, kien li estis sendita de sia ŝtato por instrui teknikon. Li restis en Bamako dum du jaroj kaj diskonigis tie Esperanton. Frukto de liaj kursoj estis sendado de oficiala malia reprezentanto (lia lernanto) al ĉi-jara UK. En posta kunveno, nia israela gasto rakontis al ni pri la vivo en la "kibucoj". Tiu temo, de li vigle priparolita multe interesis la ĉeestantojn.

+++ S-ino Jukiko Isobe, gracia japana sam-ino, en bona Esp. klarigis siajn prijapanajn diapozitivojn. Ĉeestis kelkaj neesperantistoj, s-ro Piron tuj pretis por la traduko. Si restis en nia urbo kvar tagojn, dum kiuj ges-roj Moraillon okupiĝis pri ŝi. Pro tio, ni direktas al ili dankesprimojn.

+++ Belaj, la diapozitivoj de s-ro Altherr, kiujn li klarigis per antaŭpreparita teksto. Kvankam nia preleginto estas nur kelkmonata esperantisto, lia prezentado estis bona kaj plaĉa. Jen, ekzemplo por malnovaj sed neparolemaj esperantistaj amikoj.

+++ Pro subita vojaĝo al Germanujo, s-ro Agricola ne povis prelegi; tial s-ino Stakian improvizis ekzamenvesperon. La aranĝo fariĝis tiel vigla kaj lerniga, ke ni decidis organizi pliajn tiajn studvesperojn.

+++ "En Primoŝten, mia edzino, kaj mi, travivis la plej belajn tagojn de nia vive", asertis s-ro Piron en sia parolado pri la Internacia Esp.-kampadejo. Mir-kaj demandfrazoj ofte interrompis lin en lia entuziasmiga rakonto. Rezulto: kolektiva vojaĝo al Primoŝten en la venonta somero. (?)

+++ ...kaj la aŭtuna suno brilis en la

Krokodila Parto

Il est des gens affirmant que l'Esperanto est sans personnalité, sans esprit propre; que faute de cela il ne saurait prétendre à la qualité de langue vivante; que cette grâce lui manquant, il ne peut être qu'un instrument sans nerf, sans

vie, donc appelé à mourir dans un proche avenir.

L'Esperanto langue morte ... sans esprit! Que ces gens grognons cessent donc de contempler leur seul nombril; qu'ils pensent mieux à ceux vivant au delà de nos frontières, avec lesquels, toujours davantage, nous avons commerce. Et qu'ils s'efforcent à connaître assez l'Esperanto. Ils pourront alors, choisi parmi les nombreux artistes, ciseleurs et maîtres à penser espérantistes, lire en cette humble gazette, avec un plaisir jamais diminué, autant la prose que la poésie de notre "Mirliĝon". Il va jusqu'au fond de la mine, y découvre sans cesse de nouveaux filons, en exploite avec délices et avec art les trésors. Il ne m'émousserait pas s'il faissait siennette cette affirmation de notre ami regretté, le professeur Delor: "Plus je connais l'Esperanto, plus je l'aime, car toujours mieux j'en connais les richesses offertes par ce qu'il rend possible."

L'Esperanto n'a pas d'esprit? rien en propre? Notre aimable dessinateur, Klenc Fantin, en donne un exemple (qui suffit pour aujourd'hui) en illustrant gaiement le titre de cette rubrique: KROKODILA PARTO. On peut remarquer que, malgré sa denture, le crocodile vert ne paraît pas agressif. Peut-être pourrait-on dire, avec mes amis de Gland, qu'il est... très genevois. Comme estimation à mon adresse, j'y consens en ouvrant ... mon stylo. Ce qui n'ajoute pas aux bruits de la rue.

Donc "Krokodila parto" veut dire partie du krokodile, partie réservée au crocodile, "à la crocodilisation". Or krokodili (verbe à l'infinif) veut dire crocodiller, faire comme le crocodile. J'ignore l'origine de cette expression, mais elle est propre à l'Esperanto. Elle est une des manifestations des possibilités de la langue, de son esprit personnel. Et de ceux qui la pratiquent. Krokodili se dit des espérantistes qui, entre eux, alors qu'ils devraient converser en esperanto, remontent au temps de leur toute petite enfance, à l'époque où "ils faisaient risette" dans leur langue maternelle, et échangent leurs propos par le moyen de leur langue nationale. Chassez le naturel ...

Bien sûr, avec nos membres sympathisants "mi krokodilas" (je crocodile), "ni krokodilas" (nous crocodillons). Donc, pour nous bien comprendre, continuons, ensemble, à "krokodili".

Emile Curtenaz

Dernière heure. - Notre rédacteur chargé de la chasse aux bonnes nouvelles vient d'apprendre qu'un cours d'esperanto sera donné bientôt; Nous vous invitons à y penser maintenant et à "dénicher" des élèves. Notre enquête, aussitôt entreprise, apportera de prochains éclaircissements.

Après la dernière heure: - Le cours annoncé commencera mercredi le 14.10.64 à 20 h.15 à l'Université Populaire, rue de Saussure 6

Genevo 2.11.64

Monata informilo de
la Ĝeneva Esp-o-grupo
"LA STELO"
jare 1-a n-ro 5

★
ESPERANTO - GRUPO
LA STELO
CASE 10 RIVE GENÈVE

brasikfolio

Texte français
sur 3-eme page

La kunvenoj okazas ĉiuvendrede en Collège Moderne, rue d'Italie, ĉambre 21
1-a etaĝo, je la hore 20,15

- 13.11. "Memoraĵoj de esperantista veterano", prelego de Georg Agricola
(daŭrigo) +++
20.11. EKSPo: la membroj estas petataj diri siajn impresojn pri la landa
ekspozicio. Diapozitivaj pri ĝi estos projekciataj.
+++
27.11. "Esp-o-ekzercado per diapozitivaj". Temo: "niaj amikoj, la bestoj"
(dua serio) +++
4.12. Studvespero sub la gvidado de s-ino Stakian.
+++

Averto
Neniam trinku akvon !
Unua paĉjo mortis
Kaj poste Manĵe
la pimpa servistino
Aliaj eble sekvos
Ĉar mia panjo
al la rivero portis
la reston de l'striknino.

Mirliton

Esp-o-kurso, sub la dinamika gvidado de s-ro
Piron, okazas ĉiumerkrede en la Popola Univer-
sitato "forte, kurage kaj elegante" -ĈE fajra
instruisto-
+++

La gazeto Coopération publikigas ĉiusemajne
Esp-o-lecionon
+++

La Suisse (25.10.) en artikolo pri la popoluni-
versitata laboro, mencias la Esp-o-kurson
++++

En svisa gazeto de la Naturamikoj, (1.10.) tre-
viĝas artikolo pri Esp-o
+++

La Aktivaj Stelo-membroj trovas ĉi-kune subskribfolion, kiun UEA en sia
laborplano 1965, petas la tutmondajn esperantistojn subskribigi, por ĝin
poste prezenti al Unuigintaj Nacioj. Vi estas petataj, karaj gesamideanoj
plenumi tiun taskon, kiu povos esti tre signifa por Esperanto en la mondo.
La foliojn kun la nomoj vi povas resendi al nia adreso, aŭ rekte al U.E.A.
Pliaj ekzempleroj estas je via dispone.

Deziras korespondi kun svis(in)e, s-ro Adolf Jirānek, Radvanice 177
Okres Trutnov Ĉ S S R

N

TAGO DE LA PACO. Ĉi-foje nia ĉefredak. rigardis min neridante kaj diris: "estas nur malmulte da loko por via "papero". Do mi paperetas. Pri detaloj demandu al krokodilo - kiu devige ankaŭ mallonge parolas. Teknikaj bezonoj!

Viziti Expo. estis praktike neeble, ĉar pro rekorda cifero da vizitantoj (161.539) nia grupo suferis de nevola disiĝo. Dronintaj ni estis en paca, trankvila (feliĉe!) sed homa maro. Dankon al nia prezidantino, kiu metis sur la pinton de branĉeto poŝtukon surportanta verdan stelon. Super niaj kapoj montriĝis tiu humila sed tute taŭga flageto.

Inter multaj personej parolis s-ro André Chevanne, ŝtatestro en Genevo. Pluraj oratoroj aludis pri Esperanto. Ni vidis s-inon Yvonne Privat kaj s-ron Pierre Bovet, fame konata edukisto kaj malnova samideano.

Interalie mi menciis la malfruan tagmanĝon pro longa kunveno, agrablan samideanan kuneston en restoracio. La tempo forpasis, la trajno foriris - sen ni, - spite la kuradon. Mia kruro protestis, sed dank' al agrabla babilado, Magdalena Ĉokolado kaj bonvenaj trinkaĵoj, venis fine sekvanta vagonaro.

Jen estas skizo pri la genevanoj, kiuj sukcesis ne perdi kontakton pere de hazarda flageto. Tiu ilo naskis la certecon ke estas necese havi flageton pro du kaŭzoj. 1) Kunigi samideanojn al grupestr(in)o, 2) konigi Esperanton al preterpasantoj.

Arva Sablere

+++++

EN LA PASINTA MONATO rekomenciĝis nia aktiveco en Collège Moderne. La unua kunveno estis enkondukita per la interesa prelego de Georg Agricola. Tutan historion de Esperanto ame gardas en sia koro tiu-ĉi "grandulo de la movado", kaj speciale en sia cerbo, kiu kapablas raporti la plej etajn detalojn, pri aferoj okazintaj antaŭ jardekoj. Estas ŝanco por ni havi tian samideanon, kiu post preskaŭ 50-jara laboro por la movado, ĉiam pretas al ĝia progreso. +++ Plaĉa la diapozitiva lingva ekzerco pribesta, en kiu s-ro Curtenaz prezentis al ni sian fraton (fiera ornamita azeno), dum samideanino je la prezento de porkidoj, konigis al ni sian tutan familion. S-ro Megert, kiu ŝajne ĉion konas pri la svisaj bovinoj, donis al ni interesajn klarigojn pri ili. Fieran aserton de s-ino Stakian, pri la beleco de la genevaj kolomboj, kontraŭstaris proteste s-ino Masè defendante la belon de la triestaj samspeculoj; interrompis la disputon nia sekretario deklarante ke: la plej ĉarma kolombo estas tiu, kiu kuŝas ... en telero sur la manĝotablo. +++ Plensukcesa la "Tago de la Paco" en Ekspe. Sam-ane Gaconĉ parolis pri Esp-o, trafe informis pri ĝiaj pripacaj celoj, kaj menciis kiel la kreinto, en tempo de tragika malamo inter plurrasaj homoj kie li vivis, naskis tiun VERKON, kiu ebligas al la homoj kompreni unu la alian. Varma aplaŭdo de la plurcenta publika sekvis lian paroladon. Ĉeestis la aranĝon sam-anoj el pluraj partoj de Svisio, proksimume 20 el Genevo. Okazis komuna tagmanĝo, la restoracion ni atingis po-grupete. Lastveninta (je la 16-a h) estis s-ro Hans Jakob, kiu dum la aliro devis batali kun sia obstina malsana kruro. Kara s-ro Walder, bonvolu sendi al la Stelo almenaŭ 2 ekzemplerojn da esperantistaj kruroj - el la lasta eldono - fortike bandidaj, kaj 1 piedon kun tola kovrilo, por s-ro Messerli, kun rabato se eble. +++ Interese kaj mire ni sekvis Arlette en ŝia pluraventura vojaĝo al Turkio kaj Bulgario. Ŝi revenis kun novaj spertoj kaj sentoj pri tiuj homoj kaj lokoj. Pri ŝia vojaĝo interesuloj povas pruntehavi franclingvan manuskripton. La lumbildoj estis tre belaj, eĉ ravaj kelkaj.

+++ "PO" du ĉe ligna pupitre,

"MALGRAŬ" manko da vin-litre,

"SPITE" al tikla ĉapitre, - ni lernis bone uzi la ĉi-grandliterajn vortojn dum la studvespere gvidita de s-ino Stakian, sekvis la lingveksercen, montrante lumbildojn pri niaj pasintaj aranĝoj, kiuj iel revivigas niajn kunepasintajn horojn.

VENGO Sipo veturas sur la mare. La subkapitano plendas ĉe la komandanto:
-Hieraŭ vi skribis en la ŝiplibron: "Hodiaŭ la subkapitano estas ebria".
-Tio estas tute vera, respondis la komandanto; Kial? -Tio ne estas eleganta,
mia komandanto! Tio okazigos al mi malbonan noton. Estu gentila; forstrekur
tiun frazon! -Mi bedaŭras, sed ĉio, kio okazas sur la ŝipo estas notenda. La
morgaŭan tagon, la subestro okupiĝis pri la libro; kaj kiam la komandanto
malfermis ĝin preskaŭ svenis legante - Hodiaŭ la komandanto ne estis ebria-

Elfrancigis, Verda Abie

EL NIA LETERKESTO salutojn de ges-roj: Ragogna el Udine, Pino el Sicilio,
Savir el Tivon, Fantin el la Dolomitoj, Bevanda el Como kaj Fregonara, kiu
sendis aron da belaj poŝtkartoj el pluraj partoj de Ĉeĥoslovakio. Si ĵus re-
venis al Genevo post du-monata restado en tiu interesa lando, pri kiu ŝi
parolos en niaj januaraj kunvenoj.

Al ĉiuj salutsendintoj, "Brasikfolio" sincere dankas nome de la Stele.

Krokodila Paŭzo



JOURNÉE DE LA PAIX

Je tiens pour élémentaire
et pour un agréable devoir de
renseigner nos membres sympa-
thisants des effets de notre
activité. Aussi est-ce avec
joie ^{car} KROKODILAS aujourd'hui,
car il semble que nous venons
d'enregistrer un succès.

Par les soins de l'Association des Educateurs Esperantistes de Suisse de
nombreux samideanoj ont participé à la Journée de la Paix. Cette manifesta-
tion était organisée par les sociétés travaillant pour instaurer l'insais-
sable Paix. Parlant pour notre Mouvement, Mr Claude Gacond a cité le rapport
favorable d'une Commission de l'ex S.D.N., ainsi que les études de Pierre
Bovet, éminent pédagogue et esperantiste. L'assemblée parut favorablement
impressionnée; les longs applaudissements nourris nous ayant donné à le
croire.

Les effets de cette démonstration de l'existence de l'Esperanto, âgé de
77 ans, ne seront perceptibles que dans quelques temps. Ils gagneront en
efficacité s'ils sont suivis d'autres manifestations propres à renseigner
le "grand public".

C'est au Casino de l'Expo. que se réunirent les "Travailleurs de la
Paix". Cette salle de 700 places était trop petite. C'est dire que nous
eûmes un grand auditoire. Il est heureux que nous ayons pu nous faire
entendre car, pour ce qui vient de la plume ... nous ne sommes pas servi
par notre grande presse, qui assure pourtant ses lecteurs de son informa-
tion impartiale.

Cent semences se perdent, mille semences se perdent; semons, semons sans
relâche! Magnifique devise Esperantiste!

Emile Curtenaz

Genevo 2.12.64

Monata informilo de la
Geneva Esp-o-grupo
jaro 1-a n-ro 6



ESPERANTO - GRUPO
LA STELO
CASE 10 RIVE GENÈVE

Texte français
sur 3-eme page

brasikfolio

Lasta ĉi-jara kunveno en College Moderne: 11 dec. 1964
Unua, (post la kristnaskaj festotagoj): 8 jan. 1965

11.12.64 "Esperanto-ekzercado per diapozitivoj". Temo: "urboj"

13.12.64 La losanaj esperantistoj festos la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof je la horo 12.30, en la Popola Domo, Ĉambroj 5 / 6, Stelanoj estas kore invititaj. Ni veturos ĉu vagonare, ĉu aŭtomobile; laŭ interkonsento dum nia venonta kunveno.

18.12.64 En la restoracio "Sans Alcool" en placo Montbrillant n-ro 17 1-a etaĝo, okazos nia modesta zamenhofa vespero. Komuna vespermanĝo je la horo 19.30, sekvas programeto.
Menuoj je fr. 5 kaj 5.50

+++++

En novembro aperis en "La Tribune de Genève" artikolo pri: "Poesie vivante", kiu inkluzivis paragrafon pri Esperanto.

++++

Leganto de "Brasikfolio" donacis 20 fr. por ĉi-nia senpretenda kluba "gazeto". Sinceraĵ dankoj direktiĝu al tiu amiko, kiu per sia gesto ne nur subtenas nin mone, sed donas al ni stimulon en nia labore.

+++++

EL NIA LETERKESTO salutojn de sinjere Mlix Ducommun, el Cencise (Vaud), fraŭlino H. Chavan, el Losan kaj ĉarman leteron de samideano Z. Ith, iama tre aktiva esperantistino. Sinceraĵn dankejn nome de la Stelanoj.

plej sincere "BRASIKFOLIO" bondeziras
al ĉiuj FELIĈAJN FESTOTAGOJN

De jaroj spaco vakas sur la muro de mia ĉambro. Kvankam negranda, tiu spaco havas gravan destinton. Mi intencas ĝin kovri per la Atesto pri lernado. Kiam mi ĝin akiros. Amikoj jam plurfoje proponis bildojn el famaj majstroj. Vane. Eĉ foto de la kirassipe Patjemkin ne rompis mian obstinen.

Dum la venonta vintro nia klubo organizos ekzamenojn - kun la beno de SES - por la kandidatoj, kiuj sopiras akiri la Ateston. Mi estas unu el ili, kaj de ses monatoj mi laboras nur por tio. Tial mi ne povas eĉ viziti la vendredajn kunvenojn. Fine venos la grandioza momento, kiam min ekzamenos niaj spertuloj. Ili demandas pri "sia" kaj pri la rolo de l'akuzative. Ili sciivolos, kion mi preferas en la vivo. Ili petos min traduki nacilingve el "La Verda Koro". Ili korektos mian skriban taskon kaj mian akcenton. Poste ili deklaras, ke mi meritas la Ateston - kun la beno de SES. Ha! Tiu benita atesto, mi kredas jam teni ĝin en la tremantaj manoj! Nenio povus min ĝojigi pli profunde. Eĉ ne la konfidenca opinio de profesore Zuber, kiu skribis, ke sinjoro Piron kaj mi "tamen korekte uzas la lingvon, kvankam ni ne posedas diplomon". Pri la Diploma - supera aŭ ne - mi mokas. Per ĝi ili viŝu al si la... regularon! Sed la Atesto, jen kio mankas al mia feliĉo. Mi jam tiom revis pri ĝi, ke mi povas ĝin priskribi kiel belan virinon viditan ĉiunokte en agrabla sonĝo. Ĝi estos el blua papero, iom fortika, formate 21 x 15 cm, kun arte delikataj ornamoj de Curtenaz kaj Fantin, dekstramana subskribo de nia ĉefprezidantino (maldekstre), de nia vicprezidantino (supre), de nia sekretario (dekstre) kaj de nia estrarano por kulturaj aferoj (ne bildflanke) kun beno de SES (dorse). Sed ne tro malsupre. Mi ĝin subvitrigos kaj enkadrigos kaj pendigos sur la rezervita loko. Kaj poste provu iu ajn (eĉ nu, mi volas nenium ofendi!) pruvi, ke mi ne scias la lingvon. Ta! tiu povos nur leki al mi la poŝtmarkojn, kiam mi dissendos invitilojn por la festeno - kun la beno de SES. Jes, ankaŭ doktoron Sturzenegger mi invitos. Kaj ankaŭ profesoron Zuber, kompreneble. Sed ne al senakohola restoracio, ĉar mi preferus ĝui la alkolan impeton de la ĉefprezidantino. Okazos bela festo, kaj

kiam fine mi ripozon
ĝuos ombre sub cipreso
iu legos pri mi prozon
(aŭ alportos ruĝan vizon)
kun la beno de SoEse.

Mirliton

Kiam Akro, patro de ĉiuj akridoj, lecionis al sia popolo de sur alta tigeto de genisto, li ofte ripetis: - Memoru, ke duoblaj konsonantoj principe ne ekzistas en la ortografio de nia verda lingvo. Tamen, ne forgesu ke tio povas okazi en kunmetita vorto, se oni elizias la finaĵon de la unua elemento. Ekzemple: rabbesto, huffero, raddento, paperrismo, okullevo ktp. Ni scias, ni scias!! sibilis Saltabela, kiu abomenis gramatikon. -Sed tion vi ankoraŭ ne scias, ke ekzistas tamen kelkaj vortoj kun duoblaj konsonantoj, ekz: Finnlando, Galle ktp. Malaproba murmuro trakuris la sekajn herbojn. -Tiaj sciigoj estas nur por la UEA ekzameno!! Kaj gtridula pete sin turnis al la patriarke: -Prefere rakontu al ni, kion oni preparos por la zamenhofa festo? - Antaŭ ol Akro povis paroli, demandoj sagis de ĉiuj flankoj, - Ĉu oni antaŭvidas komunan vespermanĝon? Ĉu oni kantos kun akompano de gitaro? Ĉu oni ludos teatraĵojn? Ĉu oni invitos la Lozananojn? Ĉu oni finfine povos danci? Fine Akro sukcesis ĉiujn silentigi, kaj deklaris: -Ĉion vi legos en la beleta "BRASIK-FOLIO", kiu ĵus aperis. -ha, aaaaa, eeeee!! - Ĝojis la tuta amaso kaj rapide diskuris, ĉiu al sia leterkesto por vidi, ĉu la poŝtisto alportis la lastan numeron de la eta gazeto.

Hél. Chavan

Palas la flavaj folioj
Al la tero...
Sole la verdaĵ abioj
Laŭ espero
Vivas la vintran sezonon
En arbar'
Spitante la monotonon
De l'finjar',
Ili simbolas kuraĝon
En la digno,
La forton, la firmen, la plaĉon
De la ligno.

+

Same, dum perdas homar'
La esperon,
Donas aliaj sen spar'
Koroferon.
La mezdecembra naskiĝ'
Zamenhofa.

Estas por ni ne nur riĉ'
Filozofa,
Sed plej praktika donaco
Saĝoplena
Al mond' en lingva malpaco
Senkomprena.

+

Zamenhofaj pioniroj
Svarĝas ĉie...
Por la pompe flataj diroj !
Tamen tie
Estu honora dediĉo
Al Hans Jakob
Kies samtaga naskiĝo
- en duop'-*
Akcentas noblan realon
Del' destin':
Ambaŭ servis idealon
Gis la fin'.

*tamen 32 jarojn poste.

Mad Meve

Krokodila Parto



S A M I D E A N O

Samideano. C'est là un mot qui peut paraître étrange. Il est pourtant riche de sens. C'est un qualificatif noble. De plus, parcequ'il est formé de trois racines, il démontre la richesse

des possibilités offertes par l'Esperanto. Si on le démonte, voici comment il se présente: sam-ide-ano. En ajoutant a, sam devient sama: le même; ide, avec o veut dire idée, idéal (ce mot est vraiment un beau mot.) ano signifie membre, partisan, adepte. Ce qui donne, en français, cette explication: partisan de la même idée ou adepte du même idéal. Au choix du lecteur ou de l'auditeur. Nous avons estimé nécessaire de présenter, sans tarder davantage, ce développement d'un terme dont nous avons usé à votre adresse, chers samideanoj (la lettre finale j indique le pluriel et se dit comme y). Nous^{ous} sommes permis de l'utiliser, d'abord parcequ'il vous convient très bien, et en essayant de vous présenter les arguments propres à démontrer la raison d'être de l'Esperanto. D'ailleurs, est-il besoin vraiment, de faire défiler devant vous nos armes pacifiques? Nous le croyons parcequ'il faut bien répondre à ceux qui font état de leur préparation militaire servant, qu'ils disent, à défendre la paix. Prétention tout aussi fausse que vouloir éviter l'explosion en plaçant la flamme à côté du baril de benzine. Bien sûr!... puisque la flamme n'est pas sous le baril! Mais, un simple courant d'air provenant d'un "hasa-
"hasard" voulu ...

Cependant, Esperanto signifiant celui qui espère, nous terminons sur cette note joyeuse, en vous disant gracieusement: à bientôt chers samideanoj..